



ESPERANTO - PROVENCE

n° 96 - printempo 2014

Pluvo en Aprilo - por la tero utilo. (Proverbaro Esperanta - n° 22)

trimestra bulteno de la Provenca Esperanto-Federacio

federacia retejo

www.esperanto-provence.org

nia federacio sur Facebook

[www.facebook.com/
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

prezidanto

Pierre Oliva

2772 Montée du Vieux Camp

83330 Le Castellet

04 86 15 05 35

nlpo@hotmail.com

baza kotizo por aliĝo

(kun bulteno) : 6 €

ĉeko je la ordono :

"Espéranto PACA"

pagota al via loka asocio

aŭ sendota al la

kasisto

Michel Cerisay

15 Place des Vents provençaux

13140 Miramas

mcerisay@gmail.com

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain

61 Montée du Castelar

83460 Taradeau

06 42 19 68 51

p.vilain83@orange.fr

limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n° 15a de Junio 2014

bonvolu sendi al la supra retadreso
antaŭdankojn pro viaj kontribuajoj

Vorto de la Prezidanto

De 127 jaroj, t.e. de post la publikigo, en 1887, de la Unua Libro de la Zamenhofa projekto, la Esperantaj lingvo kaj movado vivas kaj viglas danke al efika laboro de sindonemaj homoj.

El tiuj, kelkaj movadpinte eminentas, dum aliaj movadkerne modestas.

Bernadette Deschanel, nia samfederacianino, estas unu el tiuj personoj, kiuj dediĉas parton de sia vivo al nia movado ĝenerale, al nia federacio precipe. De pluraj jaroj, komence de ĉiu trimestro, ŝi serioze zorgis pri la enpaĝigo de nia bulteno «*Espéranto-Provence*».

Por iel faciligi la laboron, *Bernadette* kaj *Pascal* interkonsentis, ke ekde nun enpaĝigos la bultenan enhavon la redaktoro mem.

Pro tio iomete ŝanĝiĝis la unua paĝo, kiun vi nun legas... aliaj modifoj eble sekvos.

Mi profitas la okazon por varme danki *Bernadette* pro la farita laboro, sed ankaŭ ĉiujn, kiuj antaŭis ŝin ekde la kreado de nia bulteno, kaj la *Fréjus*-an skipon, kiu plu zorgas pri la printo, enkovertigo kaj sendo de la paperaj ekzempleroj.

Pierre Oliva

Federacia Agado

Laboris la Komitato

Dum la Mediteranea Esperanto-Semajno okazis, la 9an de Marto en *Les Issambres*, komitatkunsido de *Espéranto-Provence*. El la 9 komitatanoj, ĉeestis 5, sendis povon 3. Decidite estis, ke :

- la kasisto sendos relanĉon en Februaro (ĉijare komence de Marto) al la membroj, kiuj ne ankoraŭ estas repagintaj sian kotizon.

- *Espéranto-Provence* instigos la grupojn pagi "blokan" kotizon al la klubo, federacio kaj *Espéranto-France* (ĝis nun, nur la klubo de *Gap* reagis)

- *Espéranto-Provence* aĉetos laŭtparolilon por ĉiĉerono.


Poste, la laboro konsistis el findecidoj pri la organizo de la regiona kongreso en *Aix-en-Provence*.

Federacia kongreso

Jes tamen ĝi okazis ! La kongreso de *Espéranto-Provence* estis eble anoncita tro frue (en la vintra numero) kaj iuj komplete preteratentis ! Organizante ĝin en *Aix*, ni esperis vidi homojn el la regiono (el *Aix*, *Avignon*, *Manosque*) aŭ el pli foraj urboj, kaj proponis, dank' al *Bernard Greck*, malmultekostan kaj agrablan restadejon de Amikoj de Naturo.

Ankaŭ la programo estis avangarda : peĉakuĉoj sabaton matene. Peĉakuĉoj estas japandevenaj mallongaj prelegoj pri diversaj temoj.

Tiel intervenis *Renée Triolle* pri la "Cirila alfabeto" honorigita ĉijare de UNESKO. Ŝi klarigis kun bildoj, kiel tiu alfabeto ligiĝas al religio kaj potenco. Kiam la Princo Vladimiro en Kievo intencas edziĝi kun turkino (jam gravas la aliro al Mediteranea maro) li sendas siajn "ambasadorojn" observi kiel oni plej bone honoras dion. Cirilo (filozofo) kaj lia frato Metodo entuziasmiĝas pri ortodoksa religio, kiun elprenos praa Rusio kaj donas kvazaŭan grekan alfabeton por traduki la Biblion. *Ivan Fjodorov* en 1564, do preskaŭ jarcenton post Gutenbergo, eldonas la unuan libron "Pri la sanktaj apostoloj" en la cirila alfabeto. Sovetunio trudos la cirilan alfabeton al la respublikoj, kiuj ankoraŭ ne havas skribitan lingvon aŭ ne sufiĉe fortas por defendi sin. Apud la historiaj (bulgara, makedona, serba) nun ĝi (ĉu hazarde ?) konserviĝas en la iamaj respublikoj, kiuj restas tre ligitaj al Rusio.



cirila alfabeto

Poste sekvis tre aktuala prelego de *Thierry Spanjaard* pri **Eŭropa Unio**. La prezentita skemo komplete similas al gas-fabrika kun tuboj en ĉiuj direktoj, kun instancoj elektitaj de la membro-ŝtatoj, aŭ de la civitanoj (kiel la Eŭropa Parlamento), aŭ nomumitaj de ŝtatoj aŭ de aliaj instancoj. Kun la plej diversaj povoj : iuj rajtas proponi leĝojn sed aliaj voĉdonos. La plej direktiva kaj potenca instanco estas la Komisiono, kiu konsistas el diversaj nomitaj funkciuloj, kiuj ricevas agadkampon, plejparte pri ekonomio. Tute klara estas la manko de demokrateco en la senco, ke 500 milionoj da Eŭropanoj dependas de funkciuloj !

Rose-Marie Quintin, malgraŭ piedproblemoj, veturis el Avinjono por sprite rakonti pri **edziĝfestoj en Vjetnamio**. La festo daŭras kvar tagojn, la fianĉino plurfoje ŝanĝas robon (ruĝan, laŭ la koloro de feliĉo, ŝi surmetas, sed en la religia katolika diservo ŝi aperas en okcidente blanka robo kaj en la preĝejo oni metas la virojn unuflanken kaj la virinojn aliflanken). La oficialan foton oni faras kelkajn tagojn antaŭ la edziĝo, la nova

edzino devas servi la bopatrinojn dum ses monatoj. La gastojn oni vekis je la 4a matene por eviti tro grandan varmecon, en kelkdekoj da minutoj oni malmuntas, transportas kaj muntas tendegon por ŝirmi la gastojn, do tute alia mondo eĉ se bona manĝo regalas ĉiujn !

Pro tempomanko, *Monique Arnaud* rezignis pri sia prezento de nunaj virinoj-esperantistoj kaj *Thierry Spanjaard* prezentis la **Interkonsenton pri Trans-Atlantika Partnereco**, TAPTA en la angla. Fakte, Eŭropa Komisiono preskaŭ kaŝe lasas al ses centoj da entreprenoj decidi pri interkonsento kun Usono por libera interŝanĝo. Se tiu "interkonsento" efektiviĝos, la Eŭropaj ŝtatoj perdos sian liberecon mastrumi nacian edukadon, sansistemon, publikajn transportojn ktp. kaj povos esti atakitaj pro nelojala konkurenco. Kaj ni manĝos kokidaĵojn plenajn je hormonoj, legomojn kun gene modifitaj organismoj ktp. "Hazarde", ĉiuj ĉirilataj dokumentoj estas nur en la angla, civitanoj rajtas protesti dum la sekvontaj tri monatoj !

Post tagmanĝo en restoracio, kie troviĝis homo, lerninta Esperanton en baza lernejo kun sinjoro *Carlue*, okazis **vizito** de la urbo, kiun ĉiĉeronis *Renée Triolle*.

De la 17a ĝis la 19a ekestis **diskuto pri la nuna situacio de Esperanto** (ĉu aparta lingvo ? ĉu ankoraŭ allogas la "interna ideo" ? ĉu homoj lernos ĝin pro solidareco kaj malfermo al pli justa mondo ktp. ?) la ĉeestantoj rakontis kiel ili mem venis al Esperanto kaj restis en la Esperanto-movado. Evidentiĝas, ke plej bone funkcias la vojo de buŝo al orelo, ke fizika kurso pli konkretigas la rolon de la lingvo ol reta kurso eĉ se ni, esperantistoj, devos ekz. rilati kun lernantoj tra lernu.net por krei tiun ligan.

Venis la amikeca momento kune prepari la manĝon : ni elektis "raclette" kaj evidentiĝas, ke niaj homoj memstare helpas. Iu surtabligas, alia demetas la telerojn kaj spontane lavas ilin, iu balaas aŭ servas kafon ktp. Malmultaj restis por tranokti en la dormejo, la sportistoj rapide vizitis la urbon nokte dum iuj ludis ĉetable per slipoj pri kulturaj kaj variaj demandoj.

Dimanĉon matene okazis la **Membro-Kunveno** ; sekvis aperitivo donacita de la federacio, komuna manĝo kun rapida survoja vizito de la urbo por tiuj, kiuj sabaton ne vizitis ĝin.

Iuj membroj preparis la partoprenon en aranĝo, kiu okazos en *Mouans-Sartoux* kun Eŭropaj asocioj en rilato kun la Eŭropaj balotoj.

Federacia membrokunveno

Kvankam la informoj pri la dato kaj loko kaj la diversaj raportoj aperis en la vintra numero de nia bulteno "Espéranto-Provence", nur dek unu homoj fizike ĉeestis en Aix-en-Provence la 6an de Aprilo, kaj dek ses sendis sian rajtigilon.

Ĉefaj konstatoj : se ekzistas viglaj membroj en la regiono, nur kvar grupoj regule raportas (*Fréjus - Saint-Raphaël, La Ciotat, Manosque kaj Gap*).

La asocio starigas la Mediteranean Esperanto-Semajnon (kiun tre brile organizas la grupo de *Fréjus - Saint-Raphaël*) vintrofine, lingvostaĝon fine de Novembro kaj iun aranĝon antaŭ la membrokunveno printempe. Ĝi ankaŭ eldonas bultenon rete kaj papere, "Espéranto-Provence", kiun redaktas *Pascal Vilain*. Bedaŭrinde, pro manko de kandidatoj, ĝi ne plu organizas ekzamensesion por Franca Esperanto-Instituto. Ankaŭ la nova kotizsistemo (unu sola pago por iĝi membro de la loka klubo, de la federacio kaj de la nacia asocio *Espéranto-France*) estis akceptita nur de la grupo de *Gap*, la aliaj ne sufiĉe klarigis kaj ne povis konvinki siajn membrojn.

pri ĉiuj agadoj de la federacio raportis Renée Triolle

Ĉefaj decidoj : helpi al la homoj okaze de Forumo de Asocioj aŭ aliaj eksteraj aranĝoj (se la surloka homo ne povas mem) ; pli intensive uzi la ekspozicion ; instigi la esperantistojn enŝovi Esperanton en diversajn aliajn agadojn (Tago de Virino, de Paco, Semajno de poezio ktp.) ; pluivigi la lingvon okaze de vizito de eksterlandanoj aŭ mem instigi al kunaj vizitoj, ekskursoj por krei tiujn amikajn rilatojn kaj uzi la lingvon ekster la klasoĉambro ; proponi al U.E.A. postkongreson en Provenco post la U.K. en Lillo venontjare ; okazigi la membrokunvenon dum M.E.S. kaj koncentri niajn fortojn por la UK.

Dankojn al la kunlaborantoj. Bonvenon al kunlaborantoj.



antaŭ la Domo de la Naturamikoj en Aix

Elections européennes

Les **élections européennes** de 2014 auront lieu, selon les pays, du 22 au 25 mai, afin d'élire les 751 députés européens représentant les 28 États membres de l'Union Européenne au sein du Parlement européen.

En France, nous voterons le dimanche 25 mai.

Notre pays est découpé en 8 circonscriptions parmi lesquelles le Sud-Est regroupant 3 régions : Corse, P.A.C.A et Rhône-Alpes.

Parmi les 13 listes de la circonscription Sud-Est, **E.D.E : Europe Démocratie Espéranto**, présentera 26 candidats pour 13 sièges à pourvoir.



Monique Arnaud mènera la liste E.D.E. Sud-Est, avec Pierre Grollemund, de Saint-Etienne, en 2ème position.

D'autres membres de notre fédération en font partie : Philippe Chavignon, Janine Ratouchniak, Carmen Segarra et Gilles Wallez.

Europe-Démocratie-Espéranto est un mouvement européen qui a pour objectif de défendre la démocratie linguistique en Europe, par la promotion du multilinguisme, de l'intercompréhension et de l'espéranto comme langue commune au côté des langues d'Europe.

Europe-Démocratie-Espéranto est candidat aux élections européennes de mai 2014 pour défendre entre autres :

- La construction de l'Europe du citoyen par l'introduction d'une langue commune
- L'initiation à la diversité linguistique à l'école
- Le droit à l'enseignement de toutes les langues d'Europe au collège et au lycée
- Le droit d'étudier et de travailler en français en France
- L'enseignement optionnel de l'espéranto en France et dans tous les pays de l'Union Européenne
- Le respect du plurilinguisme par les institutions européennes

El niaj federaciaj asocioj

★ 04 - E.K.E.M. - Esperanta Kulturo en Manosque

Turisma flugfolio

Malgraŭ negravaj tajperaroj (la geesperantistoj korektos mem), E.K.E.M. plezure informas pri la apero, danke al nia kunlaborado, de Esperanta versio de la flugfolio « *Balade de Porte en Porte* » ĉe la turismoficejo de *Manosque*.

Jen la retadreso :

< <http://www.ville-manosque.fr/n-ot/nos-brochures/> >
kaj poste alklaku sub la vorto "*espéranto*".

Senpera ligo por la PDF-o en Esperanto :

<http://www.ville-manosque.fr/n-ot/wp-content/uploads/2014/02/Balade-de-portes-en-portes-esperanto.pdf>

Bonvolu dissendi al via konataro.

Taŭgus danki la direktoron de la turismoficejo de Manosque sendante retmesaĝon al :

< bguillaud@ville-manosque.fr >

Esperanto en Pierrevert

De la 24a de Februaro ĝis la 1a de Marto, E.K.E.M. proponis al la urba biblioteko de Pierrevert (04) prezentadon de Esperanto, pere de diversaj dokumentoj ekspoziciitaj sur tabloj kaj paneloj.

Aldoniĝis filmo, la 27an : « Esperanto en la mondo », sekvata de debato pri la temo : « Kio estas Esperanto, kiel ĝi funkcias ? »

Informations diverses envoyées par E.K.E.M.

On est passé du franc à l'euro le 01-01-2002. L'espérantiste belge Germain Pirlot fut désigné pour dénommer la nouvelle monnaie. Entrez dans Google "premier jour de l'euro" ; cliquez ; ensuite cliquez sur "Euro wikipédia".

Jean Zay, ministre de l'éducation nationale et actuellement sur le chemin du Panthéon, estimait souhaitable de faciliter l'étude de l'espéranto.

Voir le site < Jean Zay, biographie >

Article intéressant à lire chez < [espéranto et décroissance raisonnée](#) >

pri ĉiuj informoj el Manosque informis José Grammatico



Letero al Japanoj

Nome de E.K.E.M., José Grammatico sendis la jenan leteron okaze de la Virina Tago 2014 :

Saluton, kara S-ro OSIOKA Taeko.

La geanoj de E.K.E.M. (Esperanta Kulturo En Manosque)

Al Hiroŝima Esperanto-Centro

Okaze de la Internacia Virina Tago 2014

Karaj gesamideanoj kaj negesamideanoj, Ni bondeziras al vi kaj al la tuta mondo, neniam suferi similan katastrofon. Ni ribelas kontraŭ kio alvenis al Hiroŝimo kaj bondeziras al ĉiuj, ĉefe al la infanoj, vivi en mondo pli feliĉa ol nun, sen timi pri la estonteco.

Kore kaj amike,

José Grammatico

nuna presidanto de E.K.E.M., el Manosque, urbeto ĉirkaŭ 100 km-ojn norde de Marsejlo (Marseille), Francio.

★ 13 - Esperanto - La Ciotat



amika etoso ĉirkaŭ tablo

Reĝkuko

Eĉ se Esperanto estas internacia komunikilo, indas uzi ĝin en la klubo por praktiki kaj trejniĝi. *Espéranto-La Ciotat* "festis" dum la kursohoraro, merkredon la 15an de Januaro de la 17a ĝis la 19a. Pro longa kutimo de tiuj amikaj aranĝoj, ĉiuj ĉeestantoj kontribuis per kuko aŭ trinkaĵo ! Iu floranta momento por vivigi la "internan ideon " pri amikeco, senperaj kontaktoj, interŝanĝoj de ideoj ks. Membroj de U.E.A., legante la nov-aspektan revuon " Esperanto", certe sentis "la novan venton", kiu flugas de loko al loko.

Journée de la Langue Maternelle

texte envoyé à la presse locale par Renée Triolle

Les langues sont comme les êtres vivants, elles vivent, se développent et meurent. Mais si l'UNESCO s'est mobilisé dès 2008 pour attirer l'attention sur le rôle de la langue maternelle, c'est que les nouvelles technologies, mais surtout la main-mise de langues plus puissantes, condamnent à mort les langues de pays ou régions moins puissantes sur le plan économique, commercial ou militaire.

Espéranto-la Ciotat s'est associé à cette manifestation pour une soirée festive au Grand Portique car, en permettant la communication sans la langue d'une nation, l'espéranto reste le meilleur défenseur et allié des langues. Car une langue, c'est aussi "un point de vue sur le monde, les signifiants, leurs rapports les uns avec les autres, nous renseignant sur la culture dont ils parlent, ils en sont l'armature" (Catherine de Loeper). Les participants ont fait part de leur vécu : français en Belgique ou breton en France ; russe aux Pays-Bas par exemple. Un jeune Guadeloupéen a parlé du créole, cette solution des colonisés qui s'approprient les langues des colonisateurs alors que Martine rendait compte du génocide des Chakmans au Bangladesh où accaparer les terres s'accompagne de l'école obligatoire en bengali.

Difficile de ne pas aborder le rôle impérialiste de l'anglais, "la langue de ceux qui voyagent", pour certains une évidence, pour d'autres une baudruche quand on confond conséquence et cause.

Une jeune Californienne d'origine irlandaise avec sa fillette de 11 mois reconnaissait sa responsabilité dans la transmission de la langue mais aussi la difficulté à être isolée. Le pot de l'amitié a prolongé cette soirée.



ĉe "Grand Portique" en La Ciotat

★ 13 - Esperanto - Marseille

La 8an de Januaro, dum la semajna kurso ĉe C.I.R.A., la esperantistoj kune "festis" la reĝojn. Luj, kiuj ek-lernis, revenis porokaze, aliaj, kiuj ne lernas pro bona lingvonivelo aperis kaj tiel la (malmultaj) Marsejlaj esperantistoj povis konatiĝi. Estis ankaŭ bona okazo lerni la trinkkantojn en Esperanto ĉirkaŭ duspecaj reĝaj kukoj kaj trinkaĵo.

pri La Ciotat kaj Marsejlo raportis Renée Triolle



Ĉu vi jam spektis ĝin ? Jen tre interesa filmo. Globeto intervjuas José Antonio Vergara <http://youtu.be/Gwfpqf7JY3g>

Reĝkuka festo kaj ĝenerala membrokunveno

Plian fojon, estas ja kutimo, membroj de la klubo, al kiuj aldoniĝis geamikoj, kunvenis la 26an de Januaro en la bone konata domo de Monique kaj Pierrot por la plaĉa reĝkuka tradicio.

Tiuj, kiuj ŝatas babili - bedaŭrinde ne ĉiam en nia internacia lingvo ! - venis jam antaŭtagmeze por havi la eblon kune tagmanĝi.

Sed la tago havas ankaŭ pli seriozan celon: en la posttagmezo okazis la membro-kunveno, kiu ne nur rememorigis la faritaĵojn, sed ĉefe pritraktis la venontan agadon, el kiu certe pintas la organizado de la Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres.



Mediteranea Esperanto-Semajno 8a - 15a de Marto 2014

Les Issambres, loko de la seminario, estas ne vilaĝo sed vaste dissemajtaj domoj, de la marbordo ĝis la supro de la sekaj montetoj, foje akrobate alkoĉitaj sur la deklivoj, inter *Saint-Raphaël* kaj *Saint-Tropez*. Oni povas piede promeni nur sur sinuaj ŝoseoj, hazarde sur ŝtuparo. La padon de la doganoj, laŭ la marbordo, uzas nur lertaj marŝantoj.

Ni restadis en bela, komforta hotelo kun vasta ĝardeno. Ni frandis tre variajn manĝojn, bufede servitajn. Aparta lokalo, kun vasta salono por kunvenoj, spektakloj, du pli malgrandaj salonoj, estis rezervita por la esperantistoj. Abunda libroservo estis aranĝita.

Naŭdek unu personoj partoprenis en kvar grupoj diversnivelaj.

- *Christine Graissaguel* por kelkaj komencantoj.
- *Nina Korjenerskaia* por evoluintaj komencantoj.

- *Barbara Pietrzak* gvidis paroligan grupon por dudek naŭ homoj diversnivelaj.
- Doktoro *Romano Bolognesi* prelegis antaŭ la supera grupo de dudek kvin partoprenantoj.

Distraĵoj :

- Mi promenis sur la montetoj, sola aŭ akompanata de geamikoj.
- Vizitoj estis organizitaj en « *Les-Arcs-sur-Argens* », en « *Fréjus* » kaj en la vasta ĝardeno de « *Rayol-Canadel* ». Mi plezure profitis de la lasta.
- Mi vidis homojn danci en la halo.
- Diversaj prelegoj. Precipe, tiu de Nina pri rusaj pentraĵoj estis elstara.
- La semajno finiĝis per fermvespero fare de la partoprenantoj mem. Mi ne kapablas komenti.

raportis Claude Gerlat

L'espéranto les a réunis aux Issambres



Les « Espérantophones » sont venus du monde entier pour ce nouveau rassemblement dans le magnifique cadre de Vacanciel aux Issambres. (Photo D. O.)

Le mois de mars est la période où les « Espérantophones migrants » se rassemblent au Centre de vacances Vacanciel des Issambres, qui les accueille depuis plusieurs années déjà. Ils étaient quatre-vingt-dix, venus de toutes les régions de France et d'ailleurs : Allemagne, Belgique, Espa-

gne, Italie, Japon, Pologne, Russie, Suède. Toutes ces personnes ont pu aisément communiquer et échanger tout au long de ces journées de rencontre, grâce à l'espéranto, langue universelle. Les journées étaient riches de différentes activités : cours à thèmes variés le

matin, tourisme l'après-midi, soirées culturelles ou divertissantes après le dîner. Le beau temps a bien entendu favorisé les promenades et tous les participants étaient heureux de se retrouver dans le cadre agréable de la Côte d'Azur qui en l'occurrence a fait honneur à son nom. D. O.

Var-Matin - 19an de Marto

Li diris...



Louis Lumière

(1864 - 1948)

ingénieur et industriel
inventeur, entre autres,
du Cinématographe

"Je suis convaincu que la généralisation de l'emploi de l'espéranto pourrait avoir les plus heureuses conséquences en ce qui touche les relations internationales et l'établissement de la paix universelle."

plia raporto pri la...

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

De la 8a ĝis la 15a de marto 2014 en Les Issambres - Restadejo Val d'Esquière

Ĉe la Mediteraneo jam printempas komence de marto, tie floras mimozoj kaj migdal-arboj. Ĉi-jare tiu Esperanto-semajno okazis en taŭga hotelo en Les Issambres je 30 km de Saint-Raphael kun preskaŭ 100 partoprenantoj. Estis proponitaj 3 kursoj, por komencantoj, kiun gvidis Christine Graissaguel, por parolantoj, gvidata de Barbara PIETRZAK, el Pola Radio. La prelegon pri la historio de ciferoj, kalendaroj, skrib-sistemo prizorgis Romano BOLOGNESI kun vigla partoprenado de la ĉeestantoj.



Pluraj partoprenantoj ĝuis la prelego-serion de Romano BOLOGNESI pri malnovaj ciferoj, kalendaroj, skriboj. Krome la celo estis ankaŭ paroligi la partoprenantojn per diskutoj.



La kurso por komencantoj gvidata de Christine Graissaguel.

En la posttagmezoj estis proponitaj ekskursoj al Fréjus kaj al les Arcs sur Argens.

Plej interesa ekskurso okazis per aŭtobuso al mediteranea ĝardeno. Tie oni klopodas kompreni kaj respekti la naturon, lasi ĝin tute libere kreski, eble iomete malfavore al la estetiko. Velkantaj folioj estas ofte protékto por la arboj.



La mimozoj bele kreskas en ĝardenoj proksime de la hotelo.



En la paroliga kurso estis ĉirkaŭ 30 lemlantoj, kiuj diligente sekvis la kurson de Barbara PIETRZAK

Restajo de malnova akvo-dukto en Fréjus



Jen ege agrabla semajno en komforta hotelo, bongustaj manĝoj, ĉirkaŭata de riĉa naturo ĉe lazura marbordo. Tie eblas kune ĝui amikan etoson en Esperanto-medio. Eble venontjare ankaŭ vi ĝin partoprenos.



Mediteranea ĝardeno borde de la maro

Fotoj kaj teksto Andreo

*dankegon al André Grossmann, el Mulhouse-Espéranto,
kiu verkis ĉi tiun belaspektan paĝon pri sia restado en Les Issambres*



La direktoro de la hotelo, kiu akceptis la staĝantojn de la Esperanto-Semajno, rakontis la originon de tiu impona konstruaĵo, la belega iama palaco « *Résidence du Val d'Esquières* »

Ĝi estis la rendevuejo de miliarduloj kaj artistoj : *Maurice Chevalier, Tino Rossi, Michèle Morgan, Henri Vidal*, k.t.p.
En 1931, *Paramount* tie turnis kompletan filmon.

Tiuepoke, la hotelo havis 143 luksajn plurĉambrajn apartamentojn, 400-kvadratmetran salonon, 300-kvadratmetran manĝoĉambron kaj vastegan remizon por parki multajn limuzinojn.

81 banseĝoj staris sur la privata sabla plaĝo.

Post la dua mondmilito, tiu restadejo ree malfermiĝis, sed ne revenis la miliarduloj, kiuj foriris aliloken.

En 1968, ĝi denove fermiĝis ĝis « *UMIDA* » ekestis ĝia nova posedanto en 1976. Post plurmonata laboro, la hotelo alinomiĝis « *Vacanciel - Le Val d'Esquières* ».

raportis Liliane Rousseau



83 - Espéranto - Le Beausset

Turisma Domo

Ekspozicio

Same kiel tiu de *Manosque*, la klubo de *Le Beausset* sukcesis efektiviĝi eldonon de esperantlingva flugfolio pri la urbo. Tiu dokumento aldoniĝis al la alilingvaj versioj en la prezentiloj de la turismejo.

La Turisma Domo proponis al nia klubo ornami ĝian montro-fenestron de la 8a de Oktobro ĝis la 1a de Decembro. Ni prezentos nian lingvon tra deviga temo : « *Provenco* ».

NEPRAJ VIZITINDAĴOJ EN LE BEAUSSET

NEPRAJ VIZITINDAĴOJ EN LE BEAUSSET / LBOSEV/

EN LA VILAĜO

- Granda provenca bazaro (urba centro, vendrede matene).
- Malgranda dimanĉa bazaro (matene, Placo Charles de Gaulle).
- Itinero tra la malnova vilaĝo* memstare ; senpaga dokumento je via dispo en la Turisma Domo.
- Itinero laŭ la malnovaj pordegoj de la historia centro*.
- Itinero « laŭ Provenca ario »*.
- Pupdomo (de aprilo ĝis septembro, de mardo ĝis sabato 14-18h).

APUD LA VILAĜO

- Preĝejo Nra Dipatrino de malnova Le Beausset (ĝi datumas de la XII jarcento kaj prezentas dankilsidojn) ; mirinda panoramo de okcidenta parto de la departamento Var.
- Promenado laŭ la vojo de la preĝkolonoj* (ekas je Chemin de Rouve).
- Promenado en la Valo de Silento (eko je Chemin du Gourganon).
- Malkovro de la vinproduktejoj/agnoskitaj vinoj AOC de Bandol kaj Provenco.
 - Bieno Hermitage (Le Rouve) de lundo ĝis sabato de la 9a ĝis la 12a kaj de la 14a ĝis la 17a.
 - Bieno Souviou (RN8 direkte al Signes) de oktobro ĝis fino de aprilo, de lundo ĝis sabato de la 9a ĝis la 12a kaj de la 14a ĝis la 18a ; de majo ĝis oktobro malfermita ĉiutage de la 9.30 ĝis la 12a kaj de la 15a ĝis la 19a.
 - Bieno Muelejo de la Roque/La Rok/du Beausset (RN 8, elirejo el Le Beausset direkte al Ollioules-Toulon : de lundo ĝis sabato de la 9a ĝis la 12a kaj de la 14a ĝis la 18a.

EN LA KAMPARO

- Naturdomo de la Kvar Fratoj (bieno kaj domo fermitaj en julio kaj aŭgusto)/memstaraj promenadoj, animadoj, je laĵ datoj, 2466 chemin de Signes à Ollioules, RN8 direkte al Signes, kaj ĉe la unua pado post la kruciĝo, dekstren.
- CRAPA (promenadoj kaj san-itineroj) per Chemin de la Pierre Mouraou kaj Chemin de la Gueliarde

*memstare ; senpaga dokumento je via dispo en la Turisma Domo
*tttejo : www.ville-lebeausset.fr/www.latribunedubeausset.fr



Novembra staĝo : Bonvolu jam noti en viajn agendojn, ke ĝi okazos ĉijare la 29an kaj 30an/11.

informis Pierre Oliva

Malgajiga novaĵo

Henri Puydebois mortis la 2an de Aprilo en *Puget-sur-Argens* (83).

En sia urbo, li estis bone konata kiel emerita lernejestro, kunkreanto de Laika Kultura Asocio, eksprezidanto de la artista klubo "*Palette 83*", liberpensulo kaj ankaŭ esperantisto.

Kelkaj anoj de la klubo "*Espéranto - Fréjus - Saint-Raphaël*" ankoraŭ memoras pri la francaj kanzonoj, kiujn *Henri* tradukigis kaj kantigis al ili kiam li fojfoje iĝis kursgvidanto anstataŭ *André Loisel*.

La membraro de *Espéranto-Provence* sincere funebras kaj kondolencas lian edzinon *Christiane* kaj la tutan familion.

Diversaĵoj



U.K. 2015

Vi certe jam scias, ke la Universala Kongreso 2015 de U.E.A. okazos nialande en Lillo.

Kompreneble, la Loka Organiza Komitato jam aktive preparas ĝin.

Ni ricevis de la responsulino pri ciĉeronado la jenan leteron :

Karaj amikoj,

En antaŭa mesaĝo kaj nome de la teamo kiu zorgas pri la ekskursoj dum la UK en Lillo en 2015, mi jam skribis al vi petante vian helpon por starigi liston de ciĉeronoj kaj interpretistoj, kaj informante vin pri organizo de profesinivela staĝo.

Ni nun konas la datojn de tiu staĝo kiu estos organizita en Kvinpetalo : ĝi okazos inter la 11a kaj la 15a de Junio. Temos pri altnivela staĝo kun *Anne Ambles* kaj *Catherine Kremer*, profesiaj trejnantinoj pri ciĉeronado. *Anne Ambles* priskribas la staĝon tiel : "Tio, kion ni proponas por la trejnado interesos kaj "riĉigos" ciĉeronojn kiom ajn spertajn... Krome, por stimuli elstaran kaj efikan preparadon de la ekskursoj, ni tuj ekkreas malkonkurencon, solidaran, retlaboran etoson."

Ankoraŭ mankas al ni multe da volontuloj. Pripensu la eblecon aliĝi al la skipo kaj kapti la okazon kleriĝi dum la staĝo.

Ĉu vi povus ankaŭ disvastigi tiujn informojn en viaj diversaj grupoj?

Amikajn salutojn,

Katja Boen

por sekvi la U.K-on sur la *Facebook*-paĝoj :

<https://www.facebook.com/lille2015>



Informado

Kiel informi sen tro da laboro 1 000 000 da homoj ? Informado restas la unua paŝo : antaŭ ol lerni la lingvon kaj uzi ĝin, la francoj bezonas scii, ke Esperanto ekzistas .

Cyrille Hurstel proponas : <http://brila-aktivulo.com>

Subvenciataj seminarioj

De la 16a ĝis la 22a de Aprilo, en urbeto *Castelsardo* sur la itala insulo Sardinio, okazos I.J.F. (Internacia Junulara Festivalo).

Vidu la retejon : <http://iej.esperanto.it/ijf/?lang=eo>

Kadre de ĝi okazos seminario pri organizado de eventoj. Eblos ekscii kiel kunmeti programon, kiel administri eventon, kiel prepari buĝeton.

La seminario estas la dua organizata kadre de dujara partneriĝo, subvenciata de Eŭropa Unio, pere de la programo Tutviva Lernado - Grundtvig - Partnerado.

La projekton "Volontulado kiel persona pluevoluiĝo : kiel pliboniĝi ?" partoprenas pola, nederlanda, skota, itala, franca E-asocioj kaj la federacio E.D.E.

La federacio Eŭropo-Demokratio-Esperanto (F-EDE), subvencias parton de la vojaĝo kaj restado por pluraj homoj.

Ĉar F-EDE estas registrita en Francujo kaj helpata de franca Grundtvig-agentejo, la subvencio devas loĝi en Francujo.

Dum I.J.F., la subvencio partoprenas la seminarion (dum 1 aŭ 2 tagoj) kaj reprezentas F-EDE-n.

La sekvaj subvenciataj renkontoj estos :

en Junio - Skotujo : Tutkelta kongreso

<http://www.skotlando.org/index.php/panceltic-congress-tutkelta-kongreso> en Skotujo

en Novembro – Flandrujo : K.K.P.S.

<http://kkps-klacxkunveno.wikispaces.com/hejmo>

Pri kio temas tiu subvencio ?

Vidu ĉe : <http://e-d-e.org/LLP>



La kvinjara Katinjo sentas sin malatentata de la plenkreskuloj. Vespere, ĉe la enlitiĝo, ŝi plendas al la patrino :

"La homoj estas malbonaj. Ĉiuj pensas nur pri si. Nur mi pensas pri mi !"

Renkonto

Danke al *Bert Schumann*, el la kastelo Greziljono, nia federacio estis informita, ke esperantisto loĝanta en *Hyères*, S-ro *Marc Jeannier*, deziras donaci kelkajn el siaj Eo-libroj.

Pascal kaj mi tiam decidis viziti lin. La renkonto okazis la 20an de Februaro, kaj ni plezure konatiĝis kun afabla samideano, naskiĝinta en 1920 kaj iĝinta esperantisto en 1985, post sia emeritiĝo.

Marc eklernis nian lingvon en *Hyères* kaj estis membro de iama Eo-asocio en Tulono, « Tulona Espero », kies instruanto li cetere iĝis. Li ofte staĝumis en Kvinpetalo kaj Greziljono, partoprenis en du Universalaj Kongresoj (la 74a en Brajtono - 1989 ; la 75a en Havano - 1990) kaj sukcese trapasis la Kapablecon en 1992.

Li organizis en Tulono filatelajn ekspoziciojn pri Eo-poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj, verkis poemojn kaj plu kolektas raraĵojn : la « Migrantajn Kartojn por la Disvastigo de Esperanto tra la Mondo » (vidu la aldonitajn fotojn).

Se hazarde iu el vi posedas tian karton kaj deziras donaci ĝin al S-ro *Jeannier*, bonvolu tion sciigi al la redaktoro de nia bulteno, kiu peros.

La donacitaj libroj (vortaroj – lernolibroj) estas nun en la klubo de *Fréjus – Saint-Raphaël*.
Korajn dankojn al la donacinto !

Mari-Roza Vilain



La Kvinpetalo

Lernloko elektita por kurseton viziti
Al tiu Kvinpetalo ĝojante mi veturis.

K viete mi eltrajnis en Poitiers sen heziti.
Venis por min atendi, tio bone aŭguris,
Iu lerta virino aŭtstirante rapide.
Ni tuj bonguste manĝis kaj longtempe parolis.
Post trankvila tranokto, mi eniris timide
En ĉambreton por studi, ĉar tion mi memvolis.
Tie mi tuj ektimis ; fakte ĉe tablo sidis
Areto da lernantoj, kiuj ŝajnis tre spertaj.
Lecionojn kaj taskojn la instruisto gvidis,
Okazis eĉ debatoj por igi nin pli lertaj.

Buresa la etoso, konstanta la laboro,
Oftegaj la ekzercoj, trejnado tre valora,
Utila la restado ; ni lernis kun fervoro.
Rapidege alvenis ekzameno rigora,
En ĉi streĉa momento, la koroj forte batis.
Se vi veturos tien, ĉe tiu kulturdomo,
Same kiel ni ĉiuj, kiuj tion konstatis,
Esperanton vi lernos... Eble sekvos diplomo.

akrostiko de Marc Jeannier



Kio estas akrostiko ?

Ĝi estas poemo, en kiu la versaj komencliteroj, sinsekve legitaj, formas vorton, nomon k.t.p.



Pri Kvinpetalo

"Kvinpetalo" (antaŭe "La Kvinpetalo") estas Esperanto-Centro en *Bouresse* apud *Poitiers*.

Tie okazas kursoj prilingvaj, staĝoj diverstemaj (literaturo, astronomio, botaniko, komputiko...) en somero kaj en pluraj feriperiodoj dum la tuta jaro, en vilaĝaj domoj, el kiuj kvin apartenas al Societo *Yvonne Martinot* (SYM).

La centron kreis en 1985 kelkaj sindonemaj esperantistoj, ĉefe francaj, interalie *Georges Lagrange*.

Ĝis la jaro 1997, ĝi estis filio de LF-koop. De tiam ĝi estas tute memstara kaj ĝi funkcias kaj disvolviĝas plu en plena sendependenco.

(el Vikipedio)

Paĝo de la komencantoj

teksto en facila Esperanto

Infano kaj marsteloj

Ĉiutage, maljunulo promenis ĉe la marbordo.
Lun matenon, li vidis kaŭrantan¹ knabeton, kiu zorge²
levprenis marstelon kaj ĵetis ĝin en la maron.

Li alproksimiĝis kaj diris :

"Saluton ! Kion do vi faras ?"

La knabeto stariĝis kaj respondis :

"Mi remetas marstelojn en la oceanon. La tajdo³
malflugas⁴ kaj ardas la suno. Se mi ne tion farus, ili
tutcerte mortus.

- Sed, respondis la maljunulo, ĉu vi konstatis, ke la
strando vaste etendiĝas ? Ĉie estas marsteloj. Vi ne
kapablos savi ĉiujn ! Via klopodo⁵ estas sensenca !"

La knabo, ĝentile lin aŭskultante, ree kaŭriĝis⁶, prenis
plian marstelon kaj, ridetante, metis ĝin en la akvon.

"Jes ja, tio havas sencon ! Almenaŭ por tiu ĉi !"

klarigoj

1 - kaŭri = sidi sur la kalkanoj (*être assis sur les talons - être accroupi*)

2 - zorgi = serioze direkti sian atenton kaj agadon al ies bono - zorge = *avec soin*

3 - tajdo = alterna kaj perioda movo de la mara akvo (*marée*)

4 - flusi / malflusi = la maro flugas kaj malflugas (*la marée est ascendante puis descendante*)

5 - klopodi = fari la necesajn penojn por atingi ion - klopodo = pena agado (*effort, peine*)

6 - kaŭriĝi = iĝi kaŭranta (*vidu 1*) = sidiĝi sur la kalkanoj (*s'accroupir*)

Ĉu ni, esperantistoj, povus lerni ion el tiu teksteto ?

Vi certe konas la poemon de Zamenhof : **La Vojo**.

Jen ĝia lasta strofo, kiu iel rilatas kun la rakonto pri la infano kaj la marsteloj :

"Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante

Ni iru la vojon celitan !

Eĉ guto malgranda, konstante frapante,

Traboras la monton granitan.

L' espero, l' obstino kaj la pacienco

Jen estas la signoj, per kies potenco

Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,

Atingos la celon en gloro. "



**Kion fari por scii,
ĉu iu estas dekstramana
aŭ maldekstramana ?**

Vi ĵetu al li ovon.

> se li kaptas ĝin per la dekstra mano, li estas dekstramana.

> se li kaptas ĝin per la maldekstra mano, li estas maldekstramana.

> se li kaptas ĝin per ambaŭ manoj, li estas ambaŭmana.

> sed, se li kaptas ĝin per la kapo, li certe estas malperta !

rimarko :

"li" estas la pronomo kutime uzata por referenci al virseksa estaĵo.

Sed Zamenhof uzis "li" por referenci ankaŭ al homo, kiam lia sekso estas por ni indiferenta.

Plurelekta demandaro

*elprenita el verkoj de R. Llorens,
eldonitaj de Esperanto-Info*



1 - gramatika

a) Nun pluv....., sed baldaŭ ne plu pluvos.

1 - os ; 2 - is ; 3 - as

b) Johano ne estas kun mi, li ĵus ir..... al la urbo.

1 - as ; 2 - is ; 3 - os

c) Post unu horo mi ir..... al la urbo, se la vetero estos bela.

1 - os ; 2 - as ; 3 - is

2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "forlaso", "malplenumo" aŭ "rezigno" por traduki la francan "abandon"

1 - de quelqu'un ou quelque chose :

2 - de droits :

3 - de devoirs :

d) elektu "buĉi", "faligi" aŭ "senkuraĝigi" por traduki la francan "abattre"

1 - faire tomber :

2 - une bête :

3 - moralement :

(solvoj en la venonta bulteno)



A noter sur votre agenda

Dans notre fédération

11 mai (date à confirmer) - Le Dramont – « Plage du Débarquement » : Pique-nique organisé par le club « Fréjus – Saint-Raphaël »
Inf. : M.Prezioso 04 94 83 06 88 ou C. Graissaguel 04 94 95 66 18

29 juin - Les Issambres (Vacancier - Val d'Esquières) : Repas et après-midi divertissante avec le club « Fréjus – Saint-Raphaël » pour fêter la fin de l'année scolaire
Inf. : M.Prezioso 04 94 83 06 88 ou C. Graissaguel 04 94 95 66 18

septembre - octobre - Forums des associations

29-30 novembre - Stage au Beausset - Maison des Frères
A l'initiative de la fédération, organisé par Nicole et Pierre Oliva

En France

23-27 avril. Stage de littérature (préparation études supérieures FEI) avec Anne Jausions, à Kvinpetalo, Bouresse .
<http://www.kvinpetalo.org/>

19-26 avril. FRINGOJ 2014, rencontre d'enfants, à Grésillon.
<http://gresillon.org/spip.php?rubrique2>

23-27 avril. Stage de littérature (préparation études supérieures FEI) avec Anne Jausions, Kvinpetalo, Bouresse.
<http://www.kvinpetalo.org/>

26 avril-4 mai. Cours du printemps, cours intensifs avec examens internationaux B1, B2 et C1, à Grésillon.
<http://gresillon.org/spip.php?rubrique2>

8-11 mai. Comédie musicale et rencontre de la chorale Interkant'plu, à Grésillon.
<http://gresillon.org/spip.php?article122>

11-16 mai. Randonnée du printemps en Bourgogne, à Dijon.

<http://orapado.wifeo.com/migrado-en-burgundio.php>

11 - 17 mai. Rencontre pour se souvenir et raconter, à Grésillon.

<http://gresillon.org/spip.php?rubrique2>

13-17 mai. Stage de traduction et préparation au certificat d'études supérieures de FEI, par Brian Moon, à Kvinpetalo, Bouresse.

<http://kvinpetalo.org/>

29 mai-1 juin. Congrès d'Espéranto-France et de la Fédération Rhône-Alpine, riche programme de réunions, rencontres, excursions, spectacles, etc., à Chambéry.

<http://esperanto-france.org/>

21-28 juin. Cours de langue, marche en montagne, sports en tout genre, à Chamonix.

<http://ffea-liono.over-blog.com/2014/01/chamonix-juin-2014.html>

29 juin - 6 juillet. Semaine touristique avec visite des châteaux de la Loire, à Grésillon.

<http://gresillon.org/spip.php?rubrique2>

1-9 août. Semaine anationale alternative et pré-congrès de SAT, à Grésillon.

<http://gresillon.org/spip.php?rubrique2>

9-16 août. 87e Congrès de SAT, à Dinan.

<http://www.satesperanto.org/-2014-87a-Dinano-.html>

9-17 août. 4e Semaine festive pour toute la famille, à Grésillon.

<http://gresillon.org/spip.php?rubrique2>

16-23 août. rencontres de Plouezec

<http://www.pluezek-esperanto.net>

25-29 août. Semaine à bicyclette en Basse-Normandie, autour de Hérouville.

[ivnicolas\(chez\)sfr.fr](http://ivnicolas(chez)sfr.fr)